Primuso Trubero

PREDIKO PRI LA KREDO

(el lia Katekismo en la jaro 1550)

Primuso Trubero
1508 - 1586



OKAZE DE 500-A NASKIĜDATREVENO DE PRIMUSO TRUBERO

Origina titolo: Sermo de vocabulo Fidei & de moribus seu affectibus, quos vera Fides excitat in homine, super haec Christi Verba, O Mulier magna est Fides tua – el la libro: Catechismus in der windischenn Sprach, sambt einer kürzen Außlegung in gesang weiß. Item die Litanai und ein predig vom rechten Glauben, gestelt durch Philopatridum Illiricum.

Tübingen, 1550

El slovena lingvo de slovenaj protestantaj verkistoj en la 16-a jarcento tradukis en Esperanton Vinko Ošlak.
Lingve konsilis Zlatko Tišljar.
Provizis per subliniaj rimarkoj kaj enpaĝigis Vinko Ošlak.
Multobligis Benjamin Hlastan.

Eldonis Trubarjev forum (Forumo de Trubero)
Ljubljana / Labako, 2008
Slovenija / Slovenio

CIP - Kataložni zapis o publikaciji
Narodna in univerzitetna knjižnica, Ljubljana

27-282.3"1550"

TRUBAR, Primož
Prediko pri la kredo : (el lia Katekismo en la jaro 1550) / Primuso Trubero ; [el slovena lingvo de slovenaj protestentaj verkistoj en la 16-a jarcento tradukis en Esperanton Vinko Ošlak].
- Ljubljana : Eldonis Trubarjev forum, 2008

Prevod dela: Sermo de vocabulo fidei & de moribus seu affectibus, quos vera fides excitat in homine, super haec Christi verba, O mulier magna est fides tua

ISBN 978-961-92432-1-3

239840000

Enkonduko

Primuso Trubero (slovene Primož Trubar, latine Primus Truberus), pioniro de slovena reformacio, purigado de kristana kredo kaj eklezio surbaze de la pura evangelio, kaj pioniro de la slovena literatura norma lingvo, aŭtoro de la unua slovena libro, *Katekismo*, kies lastan parton ni ĉi tie prezentas en Esperanto, la unua tradukisto de Nova testamento kaj de Psalmoj en la slovenan lingvon, la organizanto de propra slovena evangelia eklezio, la pioniro de slovena ĝenerala lernejsistemo kaj multo alia, naskiĝis la 9-an de junio 1508 en vilaĝo Rašica sude de Labako (Ljubljana). Lia patro Miĥaelo estis muelisto, ĉarpentisto kaj sakristiano de loka katolika preĝejo. Li estis servutulo de grafoj de Turjak. Lia familia nomo Trubero venas de la profesio „trumpetisto", kiun iu el liaj antaŭuloj praktikis en la servo al grafoj de Turjak. La latina proverbo „Nomen est omen" (nomo estas la signo) plene konfirmiĝis en la persono de Primuso Trubero: li estis dum sia tuta vivo „trumpetisto" de Dia vorto – kaj li fariĝis en multaj aspektoj „la unua", kion la latina vorto „primus" signifas.

Helpe de la grafo de Turjak la patro Miĥaelo sendis sian talentitan filon en katolikan seminarion en kroata havenurbo (tiutempe en ĝi vivis multaj slovenoj) Rijeka. Pro akuta danĝero de turka invado li preferis kontinui studadon en Salburgo (Salzburg) en nuna Aŭstrio. Fine li trovis daŭran studlokon ĉe historie konata episkopo Bonomo en Triesto. La episkopo Bonomo estis erudito de la tiama tempo. Li parolis flue ankaŭ la slovenan lingvon, ja granda parto de liaj kredantoj kaj urbanoj de Triesto estis slovenoj. Kvankam li estis katolika episkopo, li montris fortan intereson kaj simpation por reformaciaj ideoj de Erasmo de Roterdamo, Lutero, Kalvino kaj aliaj, kiuj pretendis purigi la mezepokan eklezion de korupto kaj falsaj doktrinoj. Tiel, jen la paradokso, Trubero ne renkontis instruojn de protestantismo en germana lando de iu protestanta teologo aŭ predikanto, sed ĉe romkatolika episkopo en ital-

slovena urbo Triesto. La episkopo Petro Bonomo zorgis ankaŭ pri aliaj aspektoj de la vivo kaj spirita kresko de Primuso Trubero. Li, forta subtenanto de muziko kaj kantado, engaĝis Primuson en sia kortega koruso. Intertempe Bonomo sendis sian seminariiston Truberon kompletigi studadon en Vieno. Tie Trubero estis atestanto de kruela katolika krimago kontraŭ konata aŭstria reformatoro Baltasaro Hubmeier (anabaptisto), kiun la habsburga povo arestis kaj kondamnis je morto sur la ŝtiparo. Trubero per propraj okuloj vidis bruli vivantan homon. La edzinon de la ŝtipbruligita „herezulo" oni ĵetis kun ligitaj manoj en Danubon. Tio lin certe finkonvinkis pri tio, kiu doktrino vere estas hereza. Post kiam Primuso jam estis konsekrita kiel katolika pastro, Bonomo donacis al li bonhavajn paroĥojn por tiel ebligi al sia favorito relative senzorgan vivon kaj sindediĉon al studado de evangelio. Ĉar Trubero pli kaj pli kuraĝe predikis, eĉ se katolika pastro, fidele al la evangelio kaj ne plu fidele al la katolika doktrino, kiun li pli kaj pli klare vidis falsa, la episkopo Textor de Labako lin elpelis el la lando kaj konfiskis lian tutan havaĵon.

Trubero fuĝis en 1547 ekzile en germanan landon kaj unue fariĝis predikanto en Rotenburgo (Rothenburg) kaj poste (en 1553) pastoro en Kempten en Bavarujo. Tiutempe li preparis sian unuan libron en slovena lingvo, la *Katekismon*, kaj eldonis ĝin en la jaro 1550. Tiel aperis la unua presita slovena libro proksimume 500 jarojn post la unua trovita slovena manskribaĵo *„Kodekso de Freising"* (slovene: Brižinski spomeniki), slovena predikpreparaĵo de iu bavaria misiisto ĉe slovenoj en tiama slovena duklando Karantanio, estiĝinta tre verŝajne en la proksimo de la lago Wört (slovene: Vrbsko jezero) en Karintio, suda provinco de Aŭstrio, en kiu ĝis hodiaŭ vivas slovena minoritato. Kurioze la unua slovena libro aperis kun germana frakturkaraktraro, kiu tiutempe estis kutima. Nur post tio Trubero definitive por slovena uzo elektis klasikan latinan karaktraron, kia ankaŭ en nia tempo estas kutime uzata. Specialajn slovenajn konsonantojn č, š, ž li kombinis tre simile

kiel Zamenhof proponinte en kazo de neekzistantaj literoj kun tegmento: sh estis š aŭ ž, zh estis č. Nur en la 19-a jarcento slovenoj sub influo de tiam moderna panslavismo adoptis por si la ĉeĥan manieron per renversita tegmento, do sammaniere kiel tion Zamenhof elektis por Esperanto: č, š, ž.

En la jaro 1561 ranguloj de Karniolio (centra provinco de slovene loĝita teritorio) invitis Truberon reveni el germana lando por fariĝi predikanto en Labako (Ljubljana). Tamen li devis baldaŭ denove fuĝi al Urach en Germanujo, kie li fondis la unuan biblian instituton en la tiama Mezeŭropo por eldoni Biblion en la slovena, kroata kaj serba lingvoj inkluzive iliajn skribmanierojn: apud la sloven-latina la kroatan glagolitan kaj serban kirilan. Denove vokita al Labako por fariĝi superintendento. Sed tiam li faris decidan „eraron”. Li eldonis sian *Aranĝon de evangelia eklezio de slovenoj* (Cerkovna ordnunga), kio tiutempe jam egalis al konstituo de propra ŝtato. Tion la tiama grandduko Karolo uzis kiel pretekston por definitive elpeli Truberon el la lando kaj konfiski la tutan eldonkvanton de la ĵus aperinta libro. Nuntempe la sola ekzistanta ekzemplero de tiu por slovenoj tiel grava libro troviĝas en la biblioteko de Vatikano. Tien ĝi venis kompreneble ne pro teologia intereso de la papa kortego, sed en la senco de denunco kaj akuzo! Trubero trovis sian lastan ekzilejon en germana urbo Derendingen, kie li funkciis kiel pastoro kaj tie li mortis en la jaro 1586. Sur la tiea evangelia preĝejo troviĝas memortabulo en la germana kaj slovena lingvoj, kiu informas la preterpasanton pri la signifo de Trubero ankaŭ por la germana protestanta eklezio. Trubero vivis normalan geedzan vivon, havis 4 infanojn kaj montriĝis eksterordinare bona kaj lerta mastro ankaŭ en nespiritaj aferoj.

Trubero tamen ne estis pioniro nur por sia slovena popolo. Li asistis ankaŭ ĉe eldonado de la Biblio kaj evangeliaj libroj en la kroata kaj serba lingvoj. Sed li pensis eĉ pli larĝskale. Li havis personan sperton rilate la danĝeron de la tiama turka imperio, kiu dum jarcentoj daŭre invadis Eŭropon. Turkaj taĉmentoj

bruligis ankaŭ lian naskiĝvilaĝon Rašica. Pro la turka minaco li antaŭtempe interrompis sian lernadon en Rijeka kaj studadon en Vieno. Por pli bone ekkoni la esencon de islama kredo kaj la enhavon de Korano, Trubero sub la sprono de siaj germanaj kunlaborantoj kaj mentoroj, speciale de fame konata teologo Jakobo Andreae en la jaro 1567 kaŝe vizitis Labakon kaj aranĝis interparolon kun la kaptita turka militestro Usraim-bego, tenita en la kastelo de Labako. La interparolo estis ebla, ĉar tiu turka militestro devenis el slava gento en Bosnio kaj tiel parolis dialekton inter la serba kaj kroata lingvoj. Sed alimaniere ol la tiamaj regantaj elitoj Trubero la solvon ne vidis en la eventuala venko per armiloj, sed en venko per la evangelio. Lia imago estis absolute kristana: montri al turkoj la evangelion kaj esperi je ilia konvertiĝo kaj en akcepto de vera kristana fido vivi en paco kun eŭropaj regnoj. Ĉar en tiu tempo la serba lingvo estis unu el ĉefaj lingvoj en turka imperio apud la turka mem, li esperis atingi multajn turkojn kaj islamigitajn slavojn de kroata kaj serba origino per uzo de serba lingvo kaj eldonado de serbe presitaj libroj. Bedaŭrinde li ne sukcesis trovi sufiĉe fidindajn kunlaborantojn en kroata kaj serba landoj kaj tiel la projekto ne efektiviĝis en la amplekso, antaŭvidita de Trubero. La ideo tamen restas aktuala ĝis nia tempo, kiam Turkio obstine kandidatas por esti akceptita en la familion de eŭropaj ŝtatoj. La problemo nuntempe estas, ke probable pli da vere novnaskitaj kristanoj jam vivas en Turkio ol en Eŭropo...

Trubero ne fariĝis la pioniro de la slovena norma lingvo, literaturo kaj nacia konscio pro siaj naciecaj motivoj, sed surbaze de la biblia instruo. Surbaze de la difino de la apostolo Paŭlo en epistolo al Romanoj 10, 17: *„La fido venas do per aŭdado kaj aŭdado per la vorto de Kristo"*, kio signifas, ke la fido venas per predikado kaj tiu el la Biblio, li devis konsideri, same kiel Lutero ĉe germanoj, ke la popolo devas ricevi Biblion en la komprenata lingvo, kiun ĝi ĉiutage uzas kaj tiel la latina Vulgato por tiu celo absolute ne taŭgas kaj ne sufiĉas. Tiel la slovena norma lingvo havas precize la saman argumenton kaj

naskiĝon kiel la germana. Ne por fanfaroni pri sia nacieco, sed por legi la vorton de Dio en propre intima lingvo, vere komprenata, kaj aŭdi predikon, do la eksplikon de la bibliaj teksteroj en la sama intima kaj komprenata gepatra lingvo. Laŭ la instruo de la Biblio, kiel oni povas legi en la unuaj ĉapitroj de la epistolo al Romanoj, la sola rimedo por atingi savon kaj repaciĝon kun Dio estas la fido. Se do Trubero volis vidi siajn samgentanojn en la ĉielo, li devis prediki al ili la Dian vorton por veki en ili veran fidon. Sed tio povis funkcii nur en ilia ĉiutaga lingvo.

Primuso Trubero komprenis, same kiel antaŭ li Lutero, ke la instruo de la romkatolika eklezio pri „sanktaj tri lingvoj", nome hebrea, greka kaj latina, estas kontraŭbiblia herezaĵo. Same kiel ĉiuj nacioj estas sanktigitaj laŭ Abrahamo (1Mos 18, 18), tio validas ankaŭ por ĉiuj lingvoj (Dan 7, 14), kion demonstris ankaŭ la pentekosta miraklo en Jerusalemo. Kompreneble tio validas ankaŭ por la internacia lingvo de Zamenhof, kaj ankaŭ li komprenis, eĉ ne estante mem kristano, la bezonon traduki la Biblion en novan lingvon. Fakte la procedo de Zamenhof ne estis tute alia ol tiu de Trubero. Kiel Trubero el diversaj dialektelementoj kompostis norman slovenan lingvon, ke eĉ la nune vivanta leganto povas kompreni la tekstojn, verkitajn de Trubero, tiel Zamenhof el lingvoelementoj kompostis norman internacian lingvon, kiun oni post pli ol 120 jaroj senĝene povas kompreni.

Kiel la dua libro de Trubero aperis lia ABC-legolibro (Abecednik). Fakte la nuna slovena mondo pli ol Katekismon rememoras kaj festas tiun duan libron. Tamen, la dua estis nur la rimedo por povi legi la unuan. Tio estis la tuta kristana formulo: scienco kaj kulturo estas verdire nur la rimedo por povi kompreni la mesaĝon de Dio. Dum la homoj tion kredis, la paŝoj de ĉiuflanka progreso estis grandaj. Nun, kiam oni pli alte taksas la rimedon ol la celon, ankaŭ la progreso ĉesis montriĝi.

Entute Trubero eldonis pli ol 20 slovenajn librojn, inter ili la plej grava estis lia traduko de Nova Testamento kaj Psalmoj.

Lia disĉiplo Georgo Dalmatin en la jaro 1584 eldonis sian kompletan tradukon de la Biblio en la slovena lingvo.

La romkatolika eklezio per militista, polica kaj juĝista helpo de habsburga imperia registaro sukcesis preskaŭ senreste ekstermi la evangelian verkon de Primuso Trubero. La lastaj slovenoj, kiuj ankoraŭ uzis la librojn de slovena protestanta epoko el la 16-a jarcento, vivis en karintia vilaĝo Zahomec (Achomitz) en la karintia valo Zila (Gail) en Aŭstrio. Nunaj heredantoj kaj kontinuantoj de la verko de Trubero estas liberaj evangeliaj komunumoj de diversaj denominaciaj nomoj, sed de unu spirito kaj sub unu kapo, nome de la biblia spirito kaj Kapo de Jesuo Kristo.

Ni preĝu kune, ke ankaŭ la internacia lingvo de Zamenhof antaŭ ĉio estu uzata por adori Dion, kio estas la unua funkcio de ĉiu lingvo, kaj por legi la Dian vorton kaj predikojn kaj katekismojn de ĝia ekspliko, kiu ne baziĝas sur la homa saĝo, sed sur la Dia vorto mem. La sorto de statistike eta (2 mio) slovena lingvo, kiu momente eĉ estas la tria laborlingvo de Eŭropa Unio, apud la franca kaj la angla, pruvas, ke la enmonda sukceso de ĉiu lingvo dependas de ĝia beniteco fare de Dio – kaj la beno venas el la ĝusta uzo de la lingvo en la senco de Dia volo: diradi veron, kanti psalmojn kaj disvastigi la evangelion (Efe 5, 19).

La tradukisto, en Klaŭdiforumo, junie 2008

SERMO DE VOCA-
bulo Fidei & de moribus ſeu affectibus, quos uera Fides excitat in homine, ſuper hæc Christi Verba, O Mulier magna eſt Fides tua.

ANa pridiga/zhes te Chriſtuſeue beſede/ D Shenaſki uclika ye tuia Vera (Matthe. xv. koku ſe ima ta beſeda/ Vera/ vtim ſuetim piſmu inu vſch pridigah/ prou ſaſtopiti/ inu kakoue ſhege oli miſli tiga zhloucka ſturi ana praua Vera/ Leta pridiga ye od primoſa truvbarie zheſtu pridigouana/ na toiſto/ te druge nega pridige vſe kaſheio/ gredo inu ſe glihaio.

Tabeſeda Vera/ muy lubi kerſu

Tekstero el la evangelio

laŭ Mateo, sur kiu baziĝas la Prediko

(konsiderante la tradukon de Trubero en la slovenan lingvon en 1555)

Jesuo foriris de tie kaj retiriĝis en la lokoj Tiro kaj Sidono. Kaj rigardu, el tiuj lokoj venis la virino el Kanaan, kriante post li per vortoj: „Sinjoro, filo de Davido, kompatu min, kompatu min! Mia filino forte suferas pro malbona spirito."

Sed li respondis eĉ ne per unu nura vorto. Liaj disĉiploj alpaŝis lin kaj petis lin per la vortoj: „Faru, ke ŝi foriru de vi, ja ŝi postkrias nin."

Sed li respondis per la vortoj: „Mi estas sendita ekskluzive al perditaj ŝafoj de la domo de Israelo."

Sed ŝi venis kaj falis antaŭ li kaj diris: „Sinjoro, helpu min!"

Kaj li respondis al ŝi per la vortoj: „Ne decas forpreni la panon de la infanoj kaj ĵeti ĝin al la hundoj."

Kaj ŝi diris: „Jes, Sinjoro, kaj tamen la hundidoj manĝas almenaŭ panerojn, falantaj de la tablo de iliaj mastroj."

Tiam Jesuo respondis al ŝi, dirante: „Ho, virino, granda estas via fido; okazu, kiel vi volas."

Kaj ŝia filino resaniĝis en la sama horo.

(Mat 15, 21-28)

La kredo

de Primuso Trubero
La Prediko de Trubero – el lia Katekismo (1550)

Sermo de vocabulo Fidei & de moribus seu affectibus, quos vera Fides excitat in homine, super haec Christi Verba, O Mulier magna est Fides tua.[1]

Prediko pri la vortoj de Kristo: „Ho, virino, granda estas via fido!" (Mat 15,28). Kiamaniere ĝuste kompreni la vorton „fido" en la Sankta skribo kaj en ĉiuj predikoj, kaj kiajn morojn aŭ kian pensmanieron incitas en la homo la ĝusta kredo. Tiun ĉi predikon Primuso Trubero ofte ripetas, ĉiuj aliaj predikoj de li ĝin koncernas kaj kun ĝi akordiĝas.

Kio estas la fido?[2]

La vorton „fido", miaj karaj kristanoj, oni foje prenas kaj komprenas kiel ĉio, per kio oni servas al Dio, ĉu ĝuste aŭ malĝuste, ĉu al Dio plaĉe aŭ ne. Tial ni parolas pri kristana, pagana kaj turka[3] kredo.

La vorto „kredo" estas uzata ankaŭ por ĉiu unuopa afero, kiun oni ekkonas kaj scias, ke ĝi ekzistas: kiel ni ĉiuj scias kaj kredas, ke ekzistas Dio, kiu kreis la teron kaj la ĉielon kaj ke ni devas al li servi.

---

[1] El la latina: Parolado (prediko) pri la vorto de la fido kaj pri kutimoj kaj sentoj (statoj), kiujn elvokas en la homo la vera fido, aldone al tio la vortoj de Kristo: Ho, virino, granda estas via fido. (Rimarko de la tradukinto, same ĉiuj sekvaj.)

[2] En la teksto de Trubero ne troviĝas interalineaj titoloj, sed ili helpas en la superrigardo de la enhavo kaj pli facila orientiĝo.

[3] En tiu tempo oni ne distingis inter la turka nacio kaj „turka", do islama kredo – do islama.

Sekve oni komprenas kiel „fido” ankaŭ tion, se iu al iu alia ion promesas kaj poste tion ankaŭ plenumas – tion oni povus nomi ankaŭ homa aŭ ĉiutaga fido.

Tamen la ĝustan fidon, pri kiu Kristo ĉie parolas en la evangelioj kaj pri ĝi skribas sankta[4] Paŭlo, apostoloj kaj profetoj, havas nur tiu, kiu ne scias kaj kredas nur, ke Dio ekzistas, sed ankaŭ konas la veran Dion, kiu estas la Patro, la Filo kaj la Sankta Spirito. Nome la kredon, laŭ kiu la homo akiras la pardonon de siaj pekoj kaj laŭ kiu li estos farita por diohava kaj justa antaŭ Dio kaj tiel li[5] eniros la ĉielon. Li ankaŭ scias, kian volon havas Dio koncerne la homon kaj firme fidas je la vorto de Dio. Per sia kredo li ĝuste adoras Dion, li prenas lin por ĉiopova kaj aŭtenta. Kvankam li nun ne vidas, ne sentas, ne povas kapti nek ĝuste kompreni, kion Dio al li parolas respektive promesas, li spite al tio kredas, ke estas kaj estos tiel, kiel Dio parolas.

La kredo sekve estas elkora, certeca kaj firma fido je la aferoj de Dio, kiujn oni ne vidas, ne sentas, ne konsumas, ne komprenas ĝuste kaj do vere malfacile kredas. Sankta Paŭlo diras: „La fido estas la bazo respektive firma fundamento de la aferoj, je kiuj ni fidas, ĝi estas la komprenebla kaj certeca evidento de la aferoj, kiujn ni ne vidas” (Heb 11, 1), kiel oni povas vidi kaj kompreni el sekvaj promesoj: Sinjoro Dio, la ĉiela Patro, samtiel Lia Filo kune kun la Sankta Spirito al ni ĉiuj, kredantaj en Jesuon, promesas, ke ni neniam mortos, sed havos la eternan vivon spite al tio, ke ni antaŭe ĉiuj devas morti. Li promesas al ni, ke Li volas nin veki el la morto, tamen antaŭe ni ĉiuj devas forputri. Pro la fido en Jesuon Li promesas al ni esti

[4] Trubero kaj aliaj protestantaj aŭtoroj uzis la vorton „sankta” en alia signifo ol estis kaj estas la katolika. Laŭ la kompreno de la reformacio kaj same de la nuna biblia ekspliko de la kristana kredo, la homo estas sankta, kiam li naskiĝas denove kaj estas sanktigita per Jesuo Kristo. Tio ne havas rilaton kun la katalogo de por sanktuloj proklamitaj mortintoj, kian havas la ortodoksa kaj la romkatolika eklezioj. En reformacia senco ankaŭ la apostolo Paŭlo uzas tiun ĉi vorton, alparolante siajn adresitojn per „al la sanktaj en...”

[5] La uzo de nur vira pronomo, tiam ĝenerala kutimo, koncernas ambaŭ seksojn.

liberaj de la peko kaj de Dia koleregо spite al tio, ke ni dum tio sentas, kiel la peko troviĝas profunde en ni kaj ke ni en tiu ĉi korpo ne povas esti sen peko. Nin, kredantajn, Dio nomas sanktaj kaj beataj, ĉar nia afero havas bonan apologion ĉe Dio kaj Dio troviĝas je nia flanko kaj nin gardas, kvankam ni pli inklinas suferi diversajn malbonŝancojn kaj plagojn ol la nekredantaj. Dio promesas al ni, ke, se kredantaj, ni suferos neniun mankon, sed ni havos sufiĉe da ĉio, kvankam ni dume ofte estas nudpiedaj, nudaj, malsataj, soifaj. Dio promesas, ke Li jam nun elaŭdas nin ĉiam kaj donas al ni, pri kio ni Lin petas, eĉ se ofte al ni ŝajnas, ke Li ne zorgas multe pri ni, ne aŭdas nin kaj ni petas kaj vokas Lin senrezulte. Resume: Dio spirite kaj korpe promesas al ni abundon da grandaj aferoj, tamen ni havas impreson, ke Li nenion al ni donas.

Se ni volus tiajn kaj aliajn konsolajn vortojn kaj promesojn de Dio kompreni kaj pripensi per propra racio kaj saĝo, eĉ speciale, kiam nia vivo iĝas tre malfacila aŭ kiam ni kuŝas en la mortolito (kaj kiam ni ne sentas kaj ni ne povas kapti ion ajn de tio, kion Dio al ni promesis), ni komencus pridubi la promesojn de Dio, ni komencus ilin ignori kaj ni eĉ defalus de Dio kaj de Lia vorto.

Tial ni en tiaj ĉagrenoj bezonas la ĝustan kredon. Tiu kredo faras en ni, ke ni firme nin apogas sur simplan, nudan promeson de Dio kaj Liajn vortojn tenas ĝis nia morto; ke ni volonte kaj humile atendas tion, kion Dio al ni promesis. Kaj ke ni sen ajna dubo fidas, ke certe venos la tempo, en kiu Dio sian vorton kaj promeson plenumos, ja Dio estas vereca kaj ĉiopova: ĉe Li nenio estas neebla – kion Li volas, tion Li ankaŭ povas (Luk 1, 37; Mrk 9, 23; Psl 113[6]). Sed se ni nun, en tiu ĉi vivo ne ricevas ĉion, kion Dio al ni promesis, ni tion certe ricevos post tiu ĉi vivo, en la ĉielo.

Nur helpe de tia fido povas la kristano en plagoj kaj tentoj stari kaj obstini kaj kontraŭstari la malfidon, kiu kaŝiĝas en nia

[6] Laŭ nia nombromaniero Psl 114 kaj 115; temas pri la verso Psl 115,3.

karno; kontraŭstari sian stultan saĝon kaj racion, tiun ĉi mondon kaj diablon, por ke ĉio ĉi nin ne devojigu aŭ miskonduku for de la Dia vorto kaj por ke ni ne dubu kaj ŝancelu koncerne Dion kaj Lian vorton.

Tamen tia fido ne venas el ni mem kaj ne kreskas el nia karno, sed ĝi estas enverŝita en nin el la ĉielo. La ĝusta kredo estas donaco de Dio, kiel pri tio atestas Kristo mem, dirante al sankta Petro tiel: „La karno kaj la sango tion ne malkovris al vi, sed mia Patro en la ĉielo" (Mat 16, 17). Tiun ĉi kredon donas al ni Dio per la vorto de sankta evangelio, kiam ni ĝin per sincera koro aŭskultas kaj ĝin akceptas kaj je ĝi kredas (Rom 10, 9-10). Kaj Dio donas ĝin al ni per la sakramentoj de sankta bapto kaj vespermanĝo de Kristo, tiel ke tia kredo de tago al tago en ni kreskas; per la povo de Sankta Spirito ĝi ŝanĝas niajn korojn al la bono kaj faras, ke ni plene kaj en certeco nin apogas je vorto de Dio kiel je firma roko respektive bazo aŭ kiel bona, firma fundamento.

Koncerne tion ni devas ankaŭ scii, ke la ĝusta kredo staras nur sur la pura, vera vorto de Dio kaj sin je ĝi apogas. Ĉiam ĝi konsideras nur ĝin kiel veran lumon aŭ celon. Tamen se la kredo de iu homo konsideras homajn regulojn aŭ tradiciajn morojn kaj staras sur la vorto de la homo, tiam tia kredo ne estas ĝusta, sed ĝi estas nur stulta kaj falsa opinio, pri kiu kelkaj havas ŝajnon esti la ĝusta kredo, sed ĝi tio ne estas. Sen la vorto de Dio tamen ne povas troviĝi la ĝusta kredo. La vorto de Dio kaj la ĝusta kredo ĉiam devas esti en kuneco; la vorto estas la fundamento, je kiu sin la kredo apogas kaj sur kiu ĝi plukonstruas. Ja la homo rajtas sin apogi je Dia vorto per certeco kiel je io certa, vera kaj konstanta. Tiu, kiu en ĝin kredas kaj al ĝi fidas, neniam estos miskondukita aŭ hontigita.

Tamen ĉiu devas scii, ke eĉ la kredo de iu persono, kiu staras sur la fundamento de la Dia vorto, sed ĝin ne komprenas adekvate kaj koruptas ĝian enhavon, ĉar ĝi ne enhavas tion, kion la persono preferas havi, estas malĝusta. Tia kredo estas falsa kredo kaj malvera opinio, pro kiu multaj estos

miskondukitaj. La kredanta homo devas do la vorton de Dio ĝuste, vere kaj bone kompreni.

Resume: la kredo estas elkora akcepto de la vorto de Dio kaj senrezerva sinapogo je ĝi. Tio signifas, ke kiam Dio parolas aŭ ordonas aŭ avertas aŭ konsolas aŭ promesas – koncerne ĉion-ĉi la kredanta persono fidas, ke tiel estas kaj tiel estos.

Kutimoj kaj pensmaniero de la homo, kiu kredas: Unue, la kredanta homo amas la vorton de Dio.

Nun ni parolos pri kutimoj kaj pensmaniero de la kredanta homo.

La homo kredanta havas unue tiun ĉi bonan kutimon kaj pensmanieron, ke li amas la vorton de Dio, ĝin volonte aŭskultas aŭ mem legas, ĝin prenas por vero kaj en ĝin kredas. Sed koncerne tion, kion parolas, instruas aŭ praktikas la homoj, estu ili sanktuloj, patriarkoj de malnova aŭ nova kredo, la falsa kristana eklezio, koncilioj, tradicio, papoj, episkopoj, sacerdotoj, monakoj aŭ iu ajn – tion la kredanta homo observas kaj prikonsideras, ĉu ilia doktrino kaj praktikoj estas en kongruo kun la vortoj de Dio, skribitaj en sanktaj libroj – en la Biblio. Kaj, se ili ne estas en akordo, tiam la kredanta homo ilin ne fidas kaj ne agas laŭ ilia doktrino. Tial la kredanta homo estas saĝa, racia kaj riĉa, feliĉa homo, eĉ se aliaj lin prenas por frenezulo kaj povrulo, kiel atestas Davido, dirante: „Ho, Dio, kiel forte mi amas viajn vortojn kaj ordonojn, ĉiun tagon mi parolas nur pri ili. Per via ordono vi faras min pli saĝa ol estas ĉiuj miaj malamikoj, tial via ordono estas mia eterna trezoro. Mi estas pli instruita ol tiuj, kiuj min instruas, ja viaj atestoj respektive vortoj estas miaj proverboj. Pli racia mi estas ol olduloj, ja mi tenas viajn ordonojn. La ordono el via buŝo estas pli bona ol multe da ormoneroj aŭ arĝentmoneroj. Tial mi amas vian ordonon pli ol puran oron kaj juvelojn" ktp. (Psl 119, 97-100.72.127). Tiel do la homo kredanta, amanta la vorton de Dio kaj ĝin aŭskultanta kaj en ĝin kredanta, ne povas akiri pli

bonan, pli utilan saĝon nek li posedas pli grandan, pli noblan varon ol la vorto de Dio estas. Tiu ĉi saĝo kaj riĉo havas antaŭ Dio validon kaj kondukas la homon el la nuna mizero en la ĉielon, ja la homo per la vorto de Dio ekkonas la veran Dion en Sankta Triunuo. Li ankaŭ ekkonas la misteran, konstantan volon de Dio, laŭ kiu Li volas esti, pro Jesuo Kristo, por la kredantoj bona kaj kompata, pardoni iliajn pekojn, helpi ilin el iliaj plagoj kaj doni al ili la eternan vivon. La niatempaj judoj, paganoj, turkoj[7] kaj eminentuloj de la tuta mondo kaj ĉiuj, kiuj ne amas la vorton de Dio, ĝin ne aŭskultas kaj en ĝin ne kredas, scias pri vera Dio fakte nenion, Dio, estanta la Patro, la Filo kaj la Sankta Spirito, same nenion pri Lia bonvolo koncerne la homojn (1Kor 2). Nur tiuj do, kiuj kredas, estas vere saĝaj, kleraj, riĉaj kaj feliĉaj antaŭ Dio. Sed jenaj, kiuj ne kredas, kiuj ne havas kutimon ami la vorton de Dio, ĝin aŭskulti kaj en ĝin kredi, estas – eĉ se ĉiuj ilin prenas por fidantaj, saĝaj, kleraj, kapablaj, tre potencaj, riĉaj kaj feliĉaj homoj – efektive antaŭ Dio stultaj, malriĉaj kaj malfeliĉaj homoj (1Kor 1, 18s.; Jer 9, 22-23).

Due, la kredanto timas la koleregon de Dio pro sia peko.

El tia unua bona kutimo, eliranta el la saĝo de la homo kredanta kaj konanta Dion, amanta Lian vorton, ĝin volonte aŭskultanta aŭ mem leganta kaj firme en ĝin kredanta, eliras ankaŭ la dua bona, utila kutimo kaj pensmaniero: tia homo komencas nun vere kaj el sincera koro timi la koleregon de Dio. Tiu, kiu kredas, ekkonas nome ĝuste el la vorto de Dio, kio la homo estas laŭ sia naturo kaj kia estas lia karaktero. Tiu ekkonas, ke la natura homo estas malica, inklina al ĉio malbona, pekulo – ke ĝuste nenio, kion li pesas, pensas, parolas aŭ praktikas, antaŭ Dio estas bona, kaj ke li en tiu ĉi vivo ne

[7] Turko estas en tiu ĉi teksto sinonimo por la islamano.

povas el si mem kontentigi la ordonojn de Dio kaj Lian volon. Li ankaŭ ĝuste komprenas kaj ekkonas, kio estas la peko, kiel forte ĝi kontraŭas Dion kaj kiel la justeco de Dio jam ek de la komenco de la mondo punas homojn pro la peko. Per korpa morto ĝi nome punis Adamon kaj Evaon kune kun ni ĉiuj, estante la infanoj de Adamo kaj heredintaj lian pekon. Kaj se ni ne kredos en Jesuon, ĝi punos nin per eterna morto. Dio ankaŭ per aliaj punoj ofte montris sian koleregon pro la peko: kiam li subakvigis la tutan mondon, kiam li pereigis la urbojn Sodomo kaj Gomoro per sulforo kaj fajro kaj kiam li dronigis en la maro egiptanojn. Eĉ pli, kvankam, judoj tiam estis Lia popolo kaj eklezio, Li ilin pro ilia malfido kaj malobeo ofte punis per fajro, glavo kaj serpentoj. La tero glutegis la parton de la popolo; pli poste Li la tutan popolon disponigis al paganoj por ĝin detrui (4Mos 16; 21; 25). Samtiel Li ankaŭ niatempe punas sian eklezion, kristanojn, per diversaj rimedoj – ekzemple per turkoj[8], per multekosteco, per pesto, per epidemioj, per korupta aristokratio, malbonetosa familio kaj najbararo, per koruptaj episkopoj, sacerdotoj, monakoj kaj per aliaj plagoj. Dio do permesas, ke ĉio-ĉi trafu la homojn pro ilia peko.

Tiom grandaj punoj de Dio tuŝas la korojn de la kredanta homo, tial li tre timas la pekon kaj la koleregon de Dio. El tia bona timo sekvas poste vera pento, tiel ke la kredanta homo nun komencas vere bedaŭri siajn pekojn kaj ilin malami; li ĉesas ilin fari kaj ligas sin ordigi sian statuson kaj vivon laŭ la volo de Dio. Tiel li ankaŭ antaŭ Dio bedaŭras siajn pekojn, sian koruptan naturon kaj grandan malfeliĉon kaj petas Lin ĉiam humile por Lia graco kaj por pardono de la pekoj. Resume: tiu, kiu kredas, pentas vere, konvertiĝas, sin deturnas de la malbono kaj komencas fari bonajn farojn.

[8] En tiu ĉi kazo temas pri veraj turkoj, nome pri tiam oftaj invadoj de Osmana imperio kontraŭ meza Eŭropo, sub kiuj multe suferis ankaŭ slovene loĝitaj provincoj.

Trie, la kredanta homo serĉas manieron, kiel fariĝi libera de peko kaj de kolerego de Dio.

Trie: la homo kredanta havas ankaŭ tiun kutimon kaj pensmanieron; kiam li ekkonis kaj komprenis, ke Dio tiel forte malamas la pekon, ke Li pro la peko punas la homojn eĉ per eterna pereo, li komencas pripensi kaj sin demandi, kiamaniere kaj helpe de kio li povus fariĝi libera de tiom teruraj aferoj, kiel estas la peko kaj la kolerego de Dio, por denove akiri Dian gracon. Pro tio tiu, kiu kredas, neniel pilgrimas al Aachen,[9] al surmontaj preĝejoj, same ne al iu monahejo por ricevi indulgencojn, sed li tenas nur la aŭtentan, veran vorton de Dio en la sankta evangelio, en ĝin kredas kaj laŭ ĝi vivas. Ja la vorto de Dio, parolita de Dio pere de anĝeloj, patriarkoj, profetoj, per Lia Filo Jesuo Kristo kaj per apostoloj estante skribita en la Biblio, al ĉiuj homoj parolas pri vera, bona, forta kaj sekura medikamento kaj bona kontraŭveneno, per kiu ni povas forigi la venenon, la pekon kaj la koleregon de Dio. Sinjoro Dio, eĉ antaŭ ol Li kreis la mondon, mem preparis tiun ĉi kuracilon kaj dediĉis ĝin por ĉiuj homoj kaj ilin surtaksigis ĝin uzi. Al tiu, kiu ĝin uzas, la veneno de la peko ne damaĝas plu. Tiu kuracilo estas Jesuo Kristo, la Filo de Dio, kiun la ĉiela Patro en eterno difinis por la savo, por la sinofero kaj kompenso por la pekoj de la tuta homa raso. Kaj la eterna, konstanta volo de Dio estas, ke al tiu, kiu kredas en Jesuon, Li pardonas ĉiujn liajn pekojn kaj retiras sian koleregon kontraŭ li.

[9] Aachen, historie konata urbo en Germanio, sidejo de la imperiestroj de mezepoka Roma imperio de germana nacio kaj pilgrima celo ankaŭ de tiutempaj slovenaj katolikoj.

Kvare, la homo kredanta manĝas la korpon de Jesuo kaj trinkas lian sangon, kaj tio signifas, ke li en Jesuon kredas.

Apud tio ni kredantaj kristanoj devas bone konscii, ke ni devas, se ni volas resaniĝi en nia animo antaŭ Dio kaj liberiĝi de niaj pekoj – por ne morti – manĝi la korpon de Jesuo kaj trinki lian sangon, kiel kelkfoje parolas Jesuo mem, dirante: „Vere vere, mi diras al vi, kiu manĝas mian karnon kaj trinkas mian vinon[10], tiu havas la eternan vivon kaj mi vekos lin en la lasta tago; kiu ne manĝas mian karnon kaj ne trinkas mian sangon, tiu ne havos la eternan vivon" (Joh 6, 53-54). Kaj kiamaniere ni manĝu lian korpon kaj trinku lian sangon? Jesuo mem klarigas, ke tion manĝi kaj trinki signifas nenion alian ol kredi, ke Jesuo estas la vera Filo de Dio – de eterno en unu gloro, unu povo kaj aŭtoritato kun Dio – kaj ke Jesuo per sia morto finpagis por niaj pekoj, repacigis nin kredantajn kun Dio kaj akiris por ni la eternan vivon. Kiu tion firme kredas – sin plene kaj en certeco apogas je tio – tiu manĝas la korpon de Jesuo kaj trinkas lian sangon[11]. La Sankta skribo ĉie parolas pri tiu ĉi spirita kuracilo: pri ĝi plej multe skribas sankta Johano, la

---

[10] Manĝi karnon kaj trinki sangon de Kristo signifas internigi Kriston en sian koron, do temas pri forta metaforo, kaj ne kanibale laŭvorte manĝi homan karnon kaj trinki homan sangon, kiel tion komprenas katolika kaj parte ankaŭ luter-protestanta doktrino. Apostolo Paŭlo mem diras en sia epistolo al Galatoj: *„Kun Kristo mi krucumiĝis, tamen mi vivas; jam ne mi mem, sed Kristo vivas en mi"* (Gal 2, 20). Aliloke Jesuo mem difinis, kiel li komprenas sian propran metaforon pri „manĝi karnon" kaj „trinki sangon": *„Mia nutraĵo estas plenumi la volon de Tiu, kiu min sendis, kaj fini Lian laboron"* (Joh 4, 34). Se Jesuo parolus rekte, li ne rompus nur la plej fortan judan tabuon, sed ankaŭ la ordonon de sia Patro, kiu strikte malpermesis konsumi sangon, por ne paroli pri manĝi homan karnon.

[11] Ĉi tie jam montriĝas, ke Trubero forlasis la falsan komprenon de la metafore eldirita ordono de Jesuo „manĝi" lian korpon kaj „trinki" lian sangon, kiun instruis Lutero kaj tiel nur iomete modifis la tute falsan katolikan doktrinon. Sub la influo de la svisa reformatoro Zwingli, kiu tiun ĉi biblian teksteron ĝuste komprenis, ankaŭ Trubero, kvankam daŭre adepto de lutera eklezio, ŝanĝis sian originan koncepton kaj instruis fidele al la Biblio, pro kio li havis problemojn kaj estis akuzita de herezo enkadre de sia eklezio.

Evangelisto kaj tre klare diras, ke ni partoprenos en ĉiuj bonaĵoj de Jesuo – temas pri pardono de pekoj kaj pri enĉielaj bonaĵoj – nur helpe de kredo en Jesuon. Jesuo diras: „Dio tiel amis la mondon, ke Li donis sian solenaskitan Filon, por ke neniu, kiu en lin kredas, estos pereigita, sed havos vivon eternan. Dio ne sendis sian Filon en la mondon por pereigi la mondon, sed por helpe de li ĝin savi; kiu en lin kredas, ne estos pereigita; kiu ne kredas, jam nun estas peregiita, ĉar li ne kredas en la nomon de la solenaskita Filo de Dio" (Joh 3, 16).

Kvine, la kredanta homo per sia kredo alkroĉas sin al la trezoro de Jesuo.

Ni ĉiuj devas bone konscii, ke la kredo estas kiel mano, monujo aŭ iu alia ujo, per kiu ni kaptas la trezoraĵon de Jesuo aŭ ĝin prenas kaj sur ni mem adaptas por ni. Jesuo Kristo mem estas la saĝo, justeco kaj sankteco de Dio, nia savo kaj pago pro niaj pekoj (1Kor 2, 24.30). La fakto, ke ni estas kaj estos antaŭ Dio saĝaj, sanktaj, justaj kaj liberaj de peko, tion ni ricevas kaj ekposedas nur per la kredo en Jesuon. Jesuo mem envestigas nin en sian trezoraĵon kaj sanktecon, por ke la ĉiela Patro nin pro li, en kiun ni kredas, prenos por justaj, saĝaj kaj sanktaj, nin amos kaj nin prenos por siaj amataj infanoj.

Pri tio, ke ni nur helpe de la kredo en Jesuon fariĝos sanaj kaj liberaj de la peka veneno kaj nur helpe de la kredo ni povos partopreni en la tuta trezoro de Jesuo – nome, en pardono de pekoj, en Dia kompato, justeco kaj sankteco kaj eterna vivo – ni volas paroli kaj tion atesti per Sankta skribo, ja ĉiu kristano tion ĉi devas scii kaj bone kompreni.

Jesuo Kristo mem rakontas al ni pri tio belan parabolon: „Kiel Moseo levis serpenton en la dezerto, samtiel la Filo de la homo devas esti levita, por ke neniu, kiu en lin kredas, estos pereigita, sed havos eternan vivon" (Joh 3, 14). Judoj, kiuj pro siaj pekoj estis pikitaj de venenaj serpentoj, malsaniĝis kaj mortis, ĉar neniu kuracilo helpis kontraŭ la veneno kaj morto,

kiu ĝin sekvas. Nur se iu rigardis super al la pendigita serpento el bronzo, tiu kaŭze de sia alrigardo al ĝi resaniĝis kaj restis en vivo. Samtiel ankaŭ ni ne povas esti resanigitaj de fortaj malsanoj kaj de eterna morto pro niaj venenigitaj pekohavaj animoj krom, se ni kredas en Jesuon Kriston.

Pri tio, ke ni fariĝas piaj kaj justaj antaŭ Dio nur helpe de la kredo en Jesuon, en siaj epistoloj kaj predikoj ĉie atestas ankaŭ la apostolo Paŭlo, kiel ekzemple: „La justeco de Dio per la kredo en Jesuon Kriston al vi ĉiuj kaj super ĉiuj, kiuj kredas" (Rom 3, 22). Sekve li diras: „Ni fariĝis justaj per la kredo, tial ni havas pacon kun Dio per Jesuo Kristo, nia Sinjoro; helpe de li ankaŭ okazis al ni, ke ni estas kondukitaj en la gracon, en kiu ni nun staras" (Rom 5, 1-2); „Sinjoro Dio faris Jesuon, kiu ne konis pekon, por esti peko (do esti ofero aŭ pago), por ke ni en li estu la justeco, kiu havas validon antaŭ Dio" (2Kor 5, 21); „Vi, viroj kaj fratoj, sciu, ke per Jesuo Kristo estas al vi mesaĝata pardono de pekoj kaj de ĉio, por kio laŭ la Leĝo de Moseo vi ne povis ricevi pravigon antaŭ Dio, kaj ke estos pravigita ĉiu, kiu kredas en Jesuon" (Agoj 13, 38-39). Sankta Johano, la Evangelisto, diras, ke Jesuo faris ankoraŭ multajn aliajn signojn, kiuj ne estas priskribitaj en lia libro, tamen tio, kio estas skribita, estas pro tio, ke ni kredu, ke Jesuo estas la vera Kristo, la Filo de Dio, kaj por ke ni per tio, ke ni kredas en lin, havu eternan vivon per lia nomo (Joh 20, 30-31). Paŭlo diras, ke tio, ke li fariĝu justa antaŭ Dio per la kredo, ne estis skribita nur por Abrahamo, sed ankaŭ por ni, kredantaj, ja ankaŭ al ni estos aljuĝita tia justeco (Rom 4, 23-24).

Kaj resume: ĉiuj patriarkoj, profetoj, apostoloj kaj sanktuloj kaj ĉiuj vortoj de Jesuo kaj liaj signoj montras al Jesuo Kristo mem kiel al la unua helpo kaj kuracilo por niaj animoj. De Dio, nome, estas al ni donita unu nura nomo sub la ĉielo, en kiu ni povas esti savitaj, diras la apostolo Petro (Agoj 4, 12). En Agoj de apostoloj 10, 43 ni same legas, ke ĉiuj profetoj atestas pri Jesuo, ke ĉiu, kiu en lin kredas, ricevos pardonon de ĉiuj pekoj. Pri tio parolas ankaŭ Paŭlo: „Estas certa tiu ĉi vorto kaj

valora por ĝin akcepti kaj sin je ĝi alkroĉi: Jesuo Kristo venis en la mondon por savi la pekulojn" (1Tim 1, 15); „Li mortis pro niaj pekoj kaj resurektis de la morto por nia justeco" (Rom 4, 25). Kvankam ni ĉiuj estas pekuloj kaj neniu povas fariĝi justa antaŭ Dio per siaj faroj, ke tiel ni ĉiuj estas kondamnitaj je pereo, Jesuo nin kompatis kaj venis al ni en la mondon kaj sin oferis sur la kruco kiel la primico kaj pago. Per tio li merite de sia sufero nin savis de la pekoj, de la morto, de diablo kaj de la infero, kaj tiel ĉiuj povas per liaj vundoj resaniĝi antaŭ Dio (Jes 53, 5).

De la komenco de la mondo ĉiuj, kiuj kredas, per sia fido serĉis sanon de sia animo, pardonon de siaj pekoj kaj kompaton de Dio nur ĉe Jesuo Kristo, kaj tion ili trovis kaj ricevis. Tiel estis ĉe Adamo kaj Evao, kiuj kredis je la semo, naskota el la virino, kaj tiel ili denove venis en kompaton de Dio. Tiel ankaŭ en la kazo de la filo de Adamo, Habelo kaj de liaj justaj infanoj kaj nepoj. Tiel same en la kazo de Abrahamo, de la patriarkoj kaj profetoj, apostoloj kaj ĉiuj sanktaj[12]. Tiel same ankaŭ en la kazo de la pagana virino en la hodiaŭa evangelio,[13] kiu ĝuste ekkonis Jesuon Kriston el liaj vortoj kaj signoj kaj firme kredis, ke li povas kaj ankaŭ volas helpi al ŝia filino. Kun tia kredo kaj fido ŝi alpaŝis lin kaj restis en kredo ĝis la fino; ŝi ne permesis, ke ŝia racio (kaj eĉ Jesuo mem per sia bruska respondo) ŝin devojigus aŭ deturnus de tia kredo kaj fido. Pro tia bona, obstina, forta fido ŝi tre plaĉis al Jesuo, tiel ke li laŭdis ŝin antaŭ ĉiuj homoj. Tial ŝi ankaŭ ricevis de li ĉion, pri kio ŝi lin petis. Samtiel ankaŭ ni en la destinita tempo ricevos de Jesuo ĉion, kion li al ni promesis, se ni nur kredas kaj ĝisfine atendas en kredo kaj firma fido. Pro Jesuo ni post tiu ĉi vivo certe ricevos la eternan.

---

[12] Ĉi tie ankaŭ Trubero ĝuste uzas la grekan esprimon en Nova testamento *hagioi*, do sanktaj kaj ne sanktuloj, kiel sin esprimas la katolikaj instruistoj, donante al la evangelia esprimo tute propran kaj kontraŭbiblian signifon. Trubero ankoraŭ ŝancelis en la uzo kaj foje diras „svetniki" (sanktuloj) kaj foje „sveti" (la sanktaj).
[13] Rigardu: Mat 15,21–28.

Sese, tia homo plene sin apogas je Dio.

Tiel la homo kredanta jam konas el la evangelioj, li scias pri tiu bona kompata volo de Dio koncerne lin. Tiel li jam firme kredas al belaj, bonaj promesoj kaj konsolo de Dio kaj en sia koro ne dubas pri tio, ke Dio, la ĉiela Patro, pro sia Filo Jesuo Kristo pardonis ĉiujn liajn pekojn kaj faris lin al si aminda, justa kaj sankta, volante doni al li la eternan vivon. Resume, li kredas, ke Dio volas esti anticipe kaj en daŭro ĉiam kompatema Dio kaj Patro, volante lin protekti kontraŭ ĉia plago. Dum li tion ĉi firme kredas, estas al li ankaŭ kun certeco donita la Sankta Spirito (Rom 5, 5). Li transformas la koron, la pensmanieron kaj ĉiujn farojn de li, kredanta homo en la senco de boneco, kaj li plantas en lin aldone la kvaran bonan kutimon kaj pensmanieron, nome, ke la homo pro Jesuo Kristo komencas plene fidi en Sinjoron Dion kaj plene sin apogi al Li por ĉio bona, kion li alstrebas. Li ne timas plu Dion kvazaŭ furiozan mastron, sed Lin amas kiel sian fidelan, kompatan Patron. Nun li vokas Lin el la ĝusta kredo kaj el perfekta amo; li ne petas plu ĉe sanktuloj, por ke ili petu favore al li, sed li feliĉe kaj ĝoje mem alpaŝas Dion, dirante al Li: „Abba, Paĉjo" (Rom 8, 15), do „Mia Paĉjo, mia kara Patro, helpu min aŭ donu al mi tion kaj tion ĉi" ktp. La Sankta Spirito, nome, firme persvadis tiun, kiu kredas, helpe de Dia vorto, ke Dio estas, pro Jesuo, lia pli granda kaj pli bona amiko ol li estas amiko por siaj infanoj aŭ lia patro tio estas por li. Tiom grandan amon la ĉiela Patro klare montris al ĉiuj homaj generacioj, kiam Li sian plej grandan kaj plej bonan kaj plej amatan trezoraĵon, nome, sian solenaskitan Filon, prefere sendis en morton ol forlasi la homon. Tial tiu, kiu vere kredas, neniam dubas pri la Dia kompato aŭ boneco; en sia koro kaj konscio li havas konvinkon, esti ĉe Dio amata kaj ke Dio volonte al li donas, kion li petas. Tamen tia homo ne petas pri io ajn alia krom pri tio, kio estas deca kaj Dio tion en sia vorto promesis doni.

Sepe, la kredanta homo komencas respekti la vorton de Dio.

El tia fido kaj aŭtenta amo al Dio, kio eliras el la kedo kaj ĝusta ekkono de Dio, akiras tiu, kiu kredas, ankaŭ la kvinan bonan kutimon kaj pensmanieron. Nun li komencas ĝuste ami ĉiujn ordonojn de Dio kaj de la Leĝo kaj komencas en sia kredo, vivo kaj statuso agi konforme al ili. Li servas al Dio nur tiamaniere, kiel tion montras al li la Dia vorto kaj kiel ordonis respektive starigis Dio mem respektive Kristo. Li emas aŭskulti Dian vorton, li ĉiam vokas al Dio kaj preĝas, li emas paroli pri Dio kaj Lia vorto; li instruas aliajn – antaŭ ĉio sian familion – ĝuste rekoni Dion kaj Lin servi. Li publike agnoskas sian kredon, kiam oni lin pri ĝi demandas; li ne frekventas plu falsajn idolanajn mesojn kaj falsajn diservojn, ĉar Dio ĉion-ĉi severe malpermesis en sia unua ordono. Kontraŭ tiaj falsaj servoj ja krias kaj skribas la profetoj kaj la apostoloj: 2Mos 20, 3–5; 1Kor 10, 7.14; 1Joh 5, 21; 1Reĝ 15. La kredanta homo restas fidela al aŭtenta Dia eklezio, nome, komunumo kaj homoj, kiuj posedas la vorton de Dio, ĝin amas, aŭskultas, en ĝin kredas kaj konforme al ĝi vivas; kiuj ricevas kaj donas sakramentojn, kiel ilin starigis Jesuo[14]. Tia homo laŭ la Dia volo el plena koro amas sian proksimulon, faras al li bonon, kiel li nur povas. Al neniu li faras malbonon, rilate ĉion li konsideras nur la instruon de Dio kaj de la apostoloj, ne vivas senregule kaj al neniu damaĝas, sed perlaboras sian panon. Li helpas al aŭtentaj predikistoj kaj instruistoj, ke ankaŭ ili povu ĝuste prediki, li

[14] Kiel montras la tuta Katekismo, Trubero agnoskis nur du „sakramentojn", kiel cetere ankaŭ Lutero: la bapton kaj la vespermanĝon de Kristo. Kristanoj en plena fidelo al la Biblio ne parolas pri „sakramentoj", ja Jesuo Kristo estas la sola vera sakramento (kiu faras ion sankta) – la bapto kaj la disdivido de la pano kaj kaliko kun vino do estas nomataj „sanktaj signoj". Oni devas konsideri, ke ankaŭ la reformacio en la 16-a jarcento nur laŭŝtupe rekonis ĉiujn aŭtentajn instruojn de la Biblio kaj senigis sin de homaj aldonaĵoj, ĉefe produktitaj en la eklezio de Romo. Verŝajne tiu proceso neniam estos perfekte finita, tial Lutero prave proverbis: *Ecclesia semper est reformanda* – Eklezio estas ĉiam reformenda!

staras flanke de malriĉaj orfoj kaj vidvinoj kaj ilin saĝe prikonsilas, vizitas malsanulojn, konsilas malĝojajn per Dia vorto, estas gastema al fremduloj, helpas malriĉajn najbarojn kaj pruntedonas al ili, li volonte dividas sian panon kun ĉiu, kiu ĝin bezonas. Kaj kiam Dio pro tia kredo aŭ pro iu alia afero donas aŭ sendas plagon, li estas humila kaj bonvola, estas preta suferi kaj rekomendas sin ĉe Dio, ĉiam Lin fidele alvokas kaj Lin petas, ke Li dum tento lin retenu en la ĝusta kredo, lin faru forta kaj helpu lin porti lian krucon. Li silente akceptas, ke okazu al li la volo de Dio. Li ne serĉas helpon ĉe sanktuloj aŭ ĉe sorĉistoj, sed nur ĉe la ĉiela Patro per Jesuo Kristo. Super ĉio-ĉi li primicas al Dio sian vivon kaj sian korpon (Rom 12, 1). Tiucele li buĉas kaj mortigas siajn malbonajn dezirojn (orgojlon, koleregon, envion, malĉastecon, avarecon, ebriecon kaj similajn pekojn), kiuj troviĝas en la korupta karno de nia korpo, por ke ili ne diskresku tro aŭ realiĝu ekstere. Li bridas sian vivon, ne disponigas ĝin al ĝia propra volo, sed ĝin devigas observi la vorton de Dio. Se tamen pro malforteco okazas, ke li spite al sia volo kaj pensmaniero falas en pezan pekon, li tion el sincera koro bedaŭras, li sentas honton antaŭ Dio kaj homoj. Li bedaŭras, kaj tio lin pelas al tio, ke li antaŭ Dio priploras sian malican, koruptan naturon, Lin petas por kompato kaj pardono de pekoj[15]. Krom tio li ĉiam dum sia vivo ekkonas, ke li en tiu ĉi vivo ne povas esti plene sen pekoj, tial li en ĉiu tago petas Dion, kiel tekstas en Patronia: „Pardonu al ni niajn ŝuldojn" ktp.

Kion ajn bonan li faras laŭ la volo de Dio aŭ homoj, ĉiam li el sia koro diras: „Tio ne sufiĉas. Mi estas nur senvalora

---

[15] Ankaŭ ĉi tie Trubero, kiel same la tuta tiama reformacio, ne estis absolute konsekvenca en apliko de Dia vorto. Kiam Dio pardonas pekojn, Li pardonas ĉiujn por ĉiam, do ankaŭ la estontajn, pri kiu nur Li scias, ke ili okazos, la pekulo mem ne. Sekve oni ne bezonas ĉiam denove peti pardonon de la pekoj, tion oni faras nur en la momento antaŭ la konvertiĝo, kiel enkonduka parto de novnaskiĝo – poste oni bedaŭras novajn pekojn kaj dankas Dion, ke ili jam estas pardonitaj! Tiel ĉe Paŭlo: *„Kaj vin, kiuj estis malvivaj per viaj eraroj kaj la necirkumcido de via karno, Li vivigis kun li, pardoninte al ni ĉiujn erarojn, elviŝinte dekreton kontraŭ ni en ordonoj skribitan, kiu estis al ni malfavora, kaj li forprenis ĝin el la mezo, najlinte ĝin al la kruco"* (Kol 2, 13-14).

servisto” (Luk 17, 10). Li ne servas Dion por merite de siaj bonaj faroj perlabori la ĉielon aŭ akiri ĉe Dio pli altan honoron ol aliaj homoj, ja li scias, ke li pro Kristo ricevas de Dio ĉion senpage – Jesuo mem perlaboris por li la ĉielon kaj la eternan vivon per sia sufero. Kion ajn li faras bona, li tion faras honore al Dio kaj por laŭdi Dion. El la ordonoj de Dio, el klarigoj de Kristo (Mat 5) kaj el la instruo de apostolo Paŭlo (Rom 7-8) la kredanta homo bone scias, ke li en tiu ĉi vivo la Diajn ordonojn ne povas perfekte observi, kiel tion opinias la mempraviguloj kaj hipokritoj, kiuj sin laŭdas mem per siaj bonaj faroj, per kiuj ili ŝarĝas ankaŭ aliajn. Tiu, kiu kredas, nome, ĉiam staras antaŭ Dio en penta pozicio kaj humilo kaj ne fieras pro sia pieco respektive pro siaj bonaj faroj antaŭ Dio kaj antaŭ homoj.

Konkludo: el la infero en la ĉielon

La ĝusta kristana kredo kreas en la homo tiel bonajn kondutojn kaj pensmanieron kaj lin tiom transformas, ke el la stulta homo fariĝas saĝa; el pekulo ĝi faras sanktulon – resume dirite, el la infero ĝi starigas lin en la ĉielon. Tion ĉi rememoru nun bone kaj observu, ke vi ricevu tian kredon de Dio, aŭskultante la vorton de Dio kaj per ĉiutaga preĝado. Kaj vivu honestan vivon. La ĉiela Patro donacu al vi tian kredon pro sia amata Filo Jesuo Kristo per la Sankta Spirito! Al Li estu la tuta honoro kaj laŭdo, ĉiam kaj poreterne. Amen.

Finis – fino.

pohleuni pokorniki / po vuki tuv
ye beſede na vſim tar is ſerza ſe
iſkaſhemo / inu de ſe tu vſe ſturi
tebi na zhaſt inu na hualo inu
kohranenu naſhih duſh / Sa uov
lo naſhiga goſpudi Jeſuſa Chri
ſtuſa Synu tuiga / kir ſtebo
ſred ſuetim duhum ye
ſhiu inu goſpo
duye imar i
nu vſelei.
A M E N.

SERMO

Tempotabelo

1508

8-an de junio naskiĝis Primuso Trubero en Rašica sude de Labako en la familio de Miĥaelo kaj Jera Trubero. La patro estis muelisto, ĉarpentisto kaj sakristiano.

1520

Trubero foriris al Rijeka/Fiume en malsupran sacerdotan seminarion.

1521

Trubero timis turkan minacon kaj translokiĝis al Salburgo (Salzburg), kie li estis seminariano de la klaŭstra lernejo de s. Petro.

1524

Trubero venis al Triesto kaj fariĝis persona adjunkto de la episkopo Petro Bonomo. Li kantis en episkopa ĥoruso. Tie li renkontis kaj legis librojn de Vergilio, Kalvino kaj Erasmo de Roterdamo.

1530

La episkopo Bonomo konsekris Truberon al sacerdoto. Trubero foriris al Laško por funkcii tie kiel la vikario de la episkopo.

1542

Per la perado de la episkopo Bonomo Trubero fariĝis kanoniko (pli altnivela sacerdoto) en Labako. Li predikas jam en la spirito de reformacio.

1549

Trubero edziniĝis kun Barbara Sitar el slovena lando.

1550

Trubero eldonis la unuajn du slovenajn librojn: Katekismon kaj ABC-libron (Abecedarium).

1557

Trubero komencis klopodi por kroata kaj serba (en kirila skribo) eldonado de evangelioj kaj katekismoj. En slovena lingvo li eldonis ĉiujn kvar evangeliojn en sia traduko kaj ampleksan Enkondukon.

1560

Trubero eldonis la duan parton de Nova testamento. La landa aristokratio lin invitis fariĝi superintendento en Labako.

1561

Trubero fondis en Urach sian Biblin instituton, la unuan tiaspecan en centra Eŭropo. Post reveno al Labako li eldonis sian tradukon de la epistoloj de Paŭlo.

1562

Trubero eldonis en sia Biblia instituto la unuan parton de Nova testamento en kroata lingvo kaj glagolita skribo. Konfliktoj kun kroataj kunlaborantoj. Post lia reveno al Labako kun sia familio, denunco ĉe la episkopo Seebach kaj enketo ĉe li.

1564

La Biblia instituto en Urach komencis disfali. Aperis la „Konstitucio de slovena kristana eklezio" (Cerkvena ordnunga). Surbaze de tiu ĉi libro Trubero estis definitive elpelita el la lando, ĉar la landa duko tion komprenis kiel ŝtatfonda ago.

1567

Laŭ la sprono de la teologo Jakobo Andreae Trubero kaŝe vizitis Labakon kaj en la kastelo de Labako interparolis kun la turka militkaptito Usraim-beg pri islama religio kaj Korano.

1572

Georgo Dalmatin, juna disĉiplo de Trubero, laŭ lia sugesto komencis traduki la tutan Biblion en slovenan lingvon. Ĝi aperis en la jaro 1584.

1574

Post 7 jaroj da paŭzo Trubero denove komencis eldoni librojn. Aperis lia granda Katekismo, noveldono de Psalmoj ktp.

1586

Trubero en sia mortolito finpretigis sian tradukon de Hauspostille de Lutero (lat. *post-illa* = poste, do: postrakonto). Li mortis 29-an de junio en Derendingen, kie li estis entombigita. Sur la preĝejo troviĝs german-slovena memortabulo pri Trubero.

1595

La filo de Primuso Trubero, Feliciano, eldonis la tradukon de la Dompostilo de Lutero en slovena lingvo.

Primuso Trubero estis dum jarcentoj unue prisilentita (fare de katolikoj), misinterpretita kiel nure kultura fenomeno (fare de liberaluloj kaj komunistoj), sed niatempe estiĝas nacia interkonsento, ke li faris sian grandegan laboron el la spirito de sia kristana kredo kaj ĝia misia taskigo kaj ke li estas la pioniro de la slovena literatura lingvo, de la slovena nacikonscio kaj konsekvence ankaŭ de la nuna sendependa slovena ŝtato. Li, nome, estis la unua, kiu diversajn lokajn identogrupojn nomis kun komuna nomo „slovenoj" kaj ĉiujn de slovenoj loĝitajn provincojn „slovena lando".

La fido venas do per aŭdado
kaj aŭdado per la vorto
de Kristo.

Romanoj 10:17

ZDRUŽENJE
TRUBARJEV
FORUM

www.primoztrubar.si